

Heinrich Heine,

## Ĉi tio vin feliĉigas

*tradukita de Manfred Retzlaff*

Ĉi tio vin feliĉigas,  
lacigas vin tio ĉi,  
se havas tri amikinojn,  
sed nur du gambjn vi.

Postkuras l'unuan matene,  
vespere alian mi,  
la tria venas tagmeze,  
endome vizitas min ŝi.

Adiaŭ vi tri amatinoj,  
mi havas du gambojn nur,  
kampan trankvilon mi volas  
ĝuadi en bela natur'.

*Traduko de la Germana poemo "Das macht den Menschen glücklich" de HEINRICH HEINE (\*1797-12-13 – †1856-02-17) en Esperanton de MANFRED RETZLAFF (\*1938-11-04) en 2015-3.*

*Arg-1133-2286 (2015-03-16 19:24:20)*

*Tiu ĉi poemo troviĝas en la kolekto "Postlegitaj poemoj, 1828 - 1844".*